Esperanto servu pacon

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetunia Esperantista Junulara Movado

N=3 (7) marto I974

Legante "Aktuale"

Dank'al siadona labore de la redaktantoj mia bulteno fariĝis vera tribuno. Num mi volas komenti kelkajn problemajn artikolojn, aperintajn en ĝi.

Abundas interesplenaj artikoloj de A.Gončarov k - do unue pri ili. Evidente, organizo de aparta tendaro por progresantoj prave ne trovis subtenon. Sed plilongigi ĝiam daŭron (kial, diable, ne?) kaj variigi ĝian programon estas en niaj fortoj. Tial estas nepre konsiderinda la listo de tendaraj laboroj. Neniu aliĝilo estu sendata aŭ akceptata sen indiko de la tendara laboro por la kandidato. Simila aĵo estis farita antaŭ SEJT-XII, kaj simila listego pendis en la tendara vestiblo. Tial en SEJT-XII ne estas senlaboruloj, kaj la programo abundis.

Ni urĝe bezonas modelan prelegon pri E-to - jes. Necesas ĝin verki kaj multobligi. Kiu estas kuraĝa? Aŭ ni anoncu konkurson? La ideo de Sibircev (la ideon eldiris Gončarov, kaj Sibircev ĝin la unua efektivigis, rim. de red.) pri poŝtkartoj, alportataj al prelegoj, estas bonega kaj vaste imitinda.

Intervjuoj kun p. veteranoj nepre endas kaj urĝe - poste estos malfrue.

Bronŝtejn parte pravas, insistante pri la severa selektado de kandidatoj (al SEJT, rim. de red.). Sed ja nur parte. Same mi konsentas, ke paroligajn kursojn en SEJT prefere gvidu la plej kapablaj gejunuloj.

El la proponoj de k-do Rogov mi tre subtenas urĝan bezonon de programo kaj konversacia lernolibro por progresantoj, sed mi dubas pri efiko de aliaj liaj proponoj - meloĝigo de sanmacianoj en unu ĉambro, patronado de ĉiuj komencantoj, tendara radio, literatura revuo por la progresantoj.

Fine mi volas varmege subteni kaj subtenigi la klopodojn de V.Cvetkova pri kreo de tutlanda katalogo de E-literaturo, troviganta en ŝtataj bibliotekoj, kaj la proponon de Harkovskij pri kompilo de libreto, konsistanta el jam publikigitaj priesperantaj artikoloj - tamen ne mallarĝigante la temaron, kiel faras tion Harkovskij.

B.Kolker (Ufa)

Denove pri SEJT-oj

Mia propono pri apartaj tendaroj por progresantoj rivevis fortan atakon en artikoloj de V.Bespalov ("A" N=5, p.3), M.Bronŝtejn ("A" N=6, p.9) kaj B.Kolker (ĉi-"A", p.I7). Ne volante konsenti kun tiuj kritikoj, mi organizis disputon pri la temo en Barnaula E-klubo, kiu okazis la I9-an de marto. Sed ankaŭ ĉi-foje mia ideo estis plene "frakasita". Do, mi ĝoju almenaŭ pro tio, ke la ideo elvokis viglan interesiĝon, kaj la temo "SEJT"oj ricevis pluan disvolvon. Dum la diskuto en nia klubo oni elmetis proponon de M.Bronŝtejn pri la neceso organizi jam ne unu, sed du SEJT-ojn en

semero.Praktike tio signifus unu SEJT-on en la ocidenta parto de nia lando,kaj la alian - en la orienta (kiu verŝajne inkluzivos ankaŭ la volgo-uralan zonon).Kune kun tiu interesa propono aperis vico da demandoj,ekzemple:ĉu samtempe?kie okazu la Konferenco?ĉu absolute samaj programoj?kiom pri E-Universitato kaj tradukista kurso ktp?

Dum nia diskuto kristaliĝis unuanimeco per jena resumo:

I)Jes,du SEJT-oj jam estas necesaj kaj ni komencu efektivigi tion en la I975 jaro.

2)Tempoj por la okazigo de SEJT-oj devas esti diversaj.La Konferenco devas okazi en la tempo inter ambaŭ SEJT-oj.Proksimume la skemo jenas:SEJT okcidenta,Konferenco,SEJT orienta.Ekzemple: SEJT en Ĉebaltio (la I6-26 de julio),la Konferenco en Apudmoskvo (la 28 de julio - 3 de aŭgusto),SEJT en Uralo(la 6-I6 de aŭgusto).

3)La programoj en siaj kernoj devas esti samaj krom negravaj (turismaj) detaloj.

4)La lekcioj en la E-Universitato(bazaj en okcidenta SEJT)estu surbendigataj kaj kune kun la presita materialo transportataj al la orienta SEJT.La tradukista kurso laboru ankaŭ laŭ la sama programo.

5)Partoprenoj de E-aktivuloj en ambaŭ SEJT-oj estu forte subtenata.

Ni esperas,ke klubestroj pridiskutos ĉi temon en siaj kluboj kaj sendos al "Aktuale" proponojn,ideojn,sugestojn.

A.Gončarov.

Pri lernolibroj.

Ni diskutas pri metodoj de instruado,pri pareligaj kursoj ktp,sed ofte senrezulte.La ĉefa kaŭzo estas manko de taŭgaj lernolibroj kaj manko de unuseca instruado.Kiom instrui en la daŭriga kurso,se komencantoj lernis diversmaniere kaj havas malegalajn sciojn?

Jam delonge mi starigis la demandon sum SEJM-Konferencoj pri verko de SEJM-Lernolibro,ĉar ĝi tamen ne estis verkata (ne legu "ver-kata"),mi decidis fari tion mem,uzante mian I5-jaran partoprenon en la movado,la instruadon de E-to kaj fremdaj lingvoj,konojn de profesia lingvisto.

La koncizo varianto de la lecionaro aperis en la ĵurnalo "Leninec" kaj la plejparto da SEJM-kluboj (almenaŭ tiuj,kiuj respondis al la propono)ĝin ricevis.Mi elspezis centojn da laborhoroj per tiom dasalgranda kurso kaj,evidente,per ie utila.La lecionara respegulad bezonojn de instruado en SEJM. Ĝi ricevis plurajn pozitivajn pritaksojn,interalie de S.G.Rubljov (la aŭtoro de fama lernolibro) kaj prof.G.Wariaghien (la prezidanto de E-Akademio).Aplikita en praktiko,ĝi donis altajn rezultojn en du rendetoj en Ufa.

Nun la libro estas plene verkita - do konsistas el 20 lecionoj kun ekzercoj en ĉiu,ĝi estas sum tajpata kaj,eventuale,multobligota.Tamen klubej ne povos ricevi ĝin grandkvante eĉ ĉe favoraj kondiĉoj per multobligo en Ufa.De oni zorgu pri la kopiado surloke.

Aplikate en la tuta SEJM (kaj,eble,ankaŭ ekster ĝi) la SEJM-lernolibro ŝanĝecigos la konojn de la komencantoj tra tuta lando. Tiam oni povos pli konkrete pareli pri la perfektigaj kursoj,ĉar oni scios,sur kio ili baziĝu.

La demando pri verkado de la daŭriga kurso restas malfermita. kaj,ekzemple,per mi ne ĉio estas klara ĉi-rilate.

Ankaŭ eĉ pli malfermita restas la demando pri la lernolibro "Ç" - "Interlingvistiko kaj Esperantologio". Esperebla, le lekcioj de la tendara universitato estu la embrio de tiu ŝi lernolibro.

B.Kelker

Pri feste Novjaro

Jam la I2-an fojon laŭvice "Junece" organizis la tradiciam renkonton de Nova Jaro. Kvankam Novjaro leŭ opinioj de multaj estas familia feste, de ĝin oni devus festi nur en tre intima rondo, sen tamen nevaj ventoj pe iomete venkas, des pli, ke tie kie estas esperantistoj, tie ĉiam estas tre amika, intima, gaja atmosfero.

Ĉijare la renkonto de Novjaro estis en ĝenizita alimaniere kompare kun la pasintaj samaj aranĝoj. Unu diferenco estas tiu, ke ĝi estis renkontata en la urbo mem (la pasintaj preskaŭ ĉiuj - en provinco), la dua diferenco: tiu ĉi feste elkreskis je scelida tritaga renkontiĝo, kies programon eniris ne nur amuzaĵoj, sed ankaŭ seriozaj demandoj pri E-movado en nia lando. La tria diferenco - la entreprenoestis tre abunde partoprenata. Entute partoprenis 45 personoj, inter kiuj estis 29 gastoj el I3 urboj; plej multe da gastoj venis el Ivanovo.

La novjara programo komenciĝis je la dekoka horo la 30-an de decembro en la klubejo de "Junece" (en la Respublika Instruista Domo). Tie ĉi estis atendataj gastoj. La venintoj povis komatiĝi kun la biblioteko de nia klubo, rigardis eldonaĵojn kun fotoj, rerspegulantaj la tutan I2-jaran historion de la junulara E-klubo. Poste la gastoj estis venigitaj al la provizore luita hotelo. Ĉis la vespero sonis kantoj kaj ridoj. Vespere ĉiuj estis invititaj al la opero de J.Strauss "Barono de ciganoj" en la Ŝtata teatro de opero kaj balete. Ĉis malfrue post la vizito al la opero ankoraŭ ne silentis la hotelo de "Junece", estis lumo.

La sekvintan tagon dum la ekskurso tra Vilnius la gastoj ĝuis eminentajn arkitekturajn monumentojn de la urbo, riĉajn muzeajnn ktp. La ekskurso al ĉiuj plaĉis eble ankaŭ pro tio ke ĝin gvidis malnovlerĝanto de Vilnius kenata al mi Vitautas Šilas, multjara esperantisto, la fondinto de "Junece" kaj ĝenerale tre aktiva membro de SEJM. Lacaj, tamen bonhumoraj ĉiuj venis per ku tagmanĝi kaj iomete ripozi post la ekskurso, ĉar je la I6-a horo ĉiujn atendis nova kaj pli serioza entrepreno.

Nun denove estis translokiĝo al la Instruista Domo. Alŝ la venintoj kaj mastroj estis proponitaj du laborproblemoj: la unua ĉu akcepti al SEJM-kandidatoj la novfenditan E-klubon de urba Kapsukas. S. Ĉaidanavičius, unu el la fondintoj de la klubo (kvankam Junecanoj) faris rekomendan paroladon; reprezentante de Kapsukas esprimis deziron eliĝi kandidato al SEJM kaj mallongo raportis pri la plenumita laboro, perspektivoj kaj planoj por la estonto. Ĉiuj vocdonis por la akcepto. La dua demando konsistis el du temoj: la unua - "Kion mi faras, por en mia medio oni sciu almenaŭ bazajn faktojn pri E-to" kaj la dua - "problemo de indiferenteco en E-movado". Tiuj du gravaj problemoj precipe la dua, jam delonge atendas seriozajn pridiskutojn kaj solvojn. Sed la diskuto ne estis fruktodona, ĉar ne ĉiuj deziris esprimi sian opinion (denove indiferenteco). Kelkaj parolintoj substrekis, ke indiferenteco, eĉ tre granda, ĉntar esperantistoj ekzistas, sed prepanoj kiel eviti tiun ĉi fenomenon preskaŭ forestis. Estis kritikitaj E-kursoj, aranĝataj de ni. En tiuj kursoj

ami kreas kondiĉojn,ke homoj ellernu la lingvon,sed ni ne faras kondiĉojn,ke la homoj,lernante la lingvon paralele estu edukataj idee,ke ili fariĝu esperantistoj veraj,kiuj ne nur bone posedas la lingvon,sed enkaŭ batalas por Esperanto,per ĝia venko. La problemo de E-movado estas tre akra,pridiskutinda,sentaŭ la Novjaro ĝi estis nur tuŝita kaj iomete priparolita,kaj nun estas atendataj opinioj de multaj kun konkretaj propozoj,kiamaniere eviti tiun fenomenon treege malutilan.A.Vaitkus el Kaunas rakontis,kion li faras,por en lia uzino ami sciu almenaŭ bazajn faktojn pri E-to kaj la E-movado.

Post la oficiala kunveno sekvis prepare por la Novjara balo, t.e. por la plej atendita parto de la Novjara programo.La geesperantistojn renkontis regalopretaj tabloj,sur kiuj ami povis trovi ĉion,kion ami volis.Meze de la tablo-rondo de lumis belega ornamita abieto.Komencigis toastoj,gratuloj,bondezirej,ĉiuj tintis por memori,kiom nevan,utilan,gajan alportis al ni la jam finiĝanta jaro,kaj prevante diveni,kia estos la Nova jaro. Finiĝis am kore aŭ unu laborjare,kaj esperantistoj estas pretaj dum la nova jaro havi pli multajn atingojn,sukcesojn pli grandajn kaj utilajn rezultojn en sia nobla laboro.

La gastoj kaj mastroj montris nin tre inventemaj:ĉiuj prezentis ŝercojn,gajajn teatraĵojn,skeĉojn kaj aliajn programerajn, ĉiuj el kiuj sekvis aplaŭdoj.

Al la 24-a hore regis treege gaja humoro,ĉiuj preparigis per plenigi la glasojn per ĉampano.Kaj jen la 24-a hore.Suprem alfluis ŝtopiloj de ĉampanbotelo.Ĉiuj plenigis la glasojn.Toasto kaŭzo de la Nova Jaro,kantoj,ludoj,dancoj...-gvidas nia brava Andrius Skiezgelas.Subite ĉiuj eksilentis - estas nevaĵe:nia vizitos Ave Frosto.Ĉiuj senpacience atendas.Jen estas li.Ami renkontas lin per muziko,kantoj,aplaŭdoj.Ĉiuj admiris la inventemon de Ave Frosto kaj ĝuis lian Novjaran gratulon,parolaĵon kaj donacetojn.Tiel en tre gaja atmosfero daŭris la balvespero.Sur muroj de la salono pendis standoj kun fotoj,kiujn venigis la partoprenintoj ĉiuper la anoncita fotokonkurso.Bedaŭrinde estas,ke ne multaj prezentis siajn fotojn por ĝi.Estis elektitaj la plej gajaj kaj interesaj fotoj.

Tiel finiĝis nia 12-a Novjara renkonto;kelkaj gastoj ekdeziris ankoraŭ pli intime konatiĝi kun Vilnius,ili pasigis ĉe ni ankoraŭ kelkajn tagojn.La lastaĵa tagon de la Novjara renkontiĝo estis organizita komuna fotado sur la monto "Tri krucoj".

Multajn sukcesojn dum la nova 1974 jaro,ĝis la sekvanta rendevuo.

Egorov P., prezidanto de la Junulara
E-klubo "Junoco".

Malformita letero al la redaktoro de "Aktuale".

Estimata redaktoro,
Ni atentigas vin,ke jam semajn fojon "Aktuale" aperis kun tre mem stranga subtitolo "Monata informilo de Sovetlanda Esperantista Movado".Ni ne komprenas la kaŭzojn,pro kiuj estas tiel kripligitaj la nomo de nia kolektivo.

Unue,kial "Sovetlanda"?En la gazetaro ami tradicie uzas "Sovetia" aŭ "Sovetunia"(la adjektivo "sovetа" signifas rilaton al sovetoj kiel formo de regado,de uzaĵ ĝin per indiki la landoj estus erare)."Sovetlanda" sonas nekutime kaj lasas impresan de malbona stila gusto.

Due - kio estas multe pli grava - kial forestas la verto

"Junulara"?Aktivuloj de SEJT-XV bone memoras la urdan disputem pri tio,ĉu necesas transformi SEJM al SEM.Pine de la dispute emi venis al komuna opinio,ke elimino de "J" el nomo SEJM nun estas tre frua kaj eĉ damĝera.De vere estas miriado,kial vi faras tian seriozan eraron en la subtitolo de "Aktuale". Unu el mi jam parolis kun vi persone pri tiu misaĵo,sed nenia, sed nenie ŝanĝiĝis.Verŝajne vi havas iajn rezonojn por tio,ĉar evidente temas jam ne pri hazarda preterlazo,sed pri konscia intenco.Tamen mi volas plej emfaze substreki,ke tiuj rezonoj absolute ne v a l i d a s.Laŭ la Regularo nia movado estas nomata "Sovetia Esperantista Junulara movado",kaj mur la Konferenco rajtas tion ŝanĝi,certe se treves respektindajn kaŭzojn.

Ni alvokas vin feriĝi la arbitrecon kaj esperas,ke la vico "Aktuale" aperos kun la ĝusta subtitolo.

V.Arelovič (Moskvo) vicprezidanto de SEJM

D.Lukjanec
M.Breuŝtejn
membroj de la Konsilantaro de SEJM

De la redaktoro.

Mi pardenpetas la legantaron pro la eraroj kaj esprimas dankemon al la aŭtoroj de la artikolo pro la kritikaj rimarkoj,kiuj estas atendataj en ĉi kaj sekvontaj numeroj.

Esperantistoj en Zervynai

Vilniuma Junulara E-klubo "Junogo" la 7-10-an de Marto organizis E-renkontiĝon,dediĉitan al la Internacia Virintago.Ĝi okazis en la antikva vilaĝ-muzeo Zervynai (distrikto Varena).Venis gastoj el Kaunas kaj Kapsukas,abunda partoprenis la festadon junecaj.La ĉefan partan de la renkontiĝa programo okupis aranĝoj ekaze de la Internacia Virintago.Per junulinaj memoj versaj,kantoj,bondeziroj,gratuloj,parolej ĉe la amikeca tablo.Per ili estis organizita konkurso. Venkintinaj ricevis premiojn."Virinaj - floroj de la mondo" - tiel nomiĝis la oficiala pregram-parto por la junulinaj.Laŭ la peto de E-klubo de Kapsukas (nova klubo) estis priparolita la temo:"Kiel mi imagas klubban laboron".La partoprenintoj faris ekskursoin tra la vilaĝe-muzeo, vizitis bienetojn de vilaĝanoj,kiujspecifas per antikva karaktero,polola arkitekturo ktp.Estis vizitita ankaŭ najbara vilaĝo,similo al Zervynai per siaj trajtoj.La grandamplekso kaj riĉa programo obligis al la esperantistoj bone kaj utile pasigi la tempon.La amikoj de la internacia lingvo revenis al la hejmoj bone ripozintaj,havante novajn fortojn kaj multan ekscitiĝo.

P.Egorov (Vilnius)

Eltiro el la listo de magnetofonbendoj deponitaj ĉe Magnetofona servo de SEJM

N-	Titolo de la surbendigo	longa	rapid.
I.	Kantas geedzoj Borisovy el Kolomna	I00	9,5
2.	Litovaj estradaj kantoj(kopio de la gramdisko)	-"-	-"-
3.	Esperanto-kurso de Gresilon (Francio)	250	9,5
4.	Pola gramdiska E-kurso de A.Pettin	I00	9,5
5.	Laboro de ĉeĥoslovakiaj E-klubej	-"-	I9,5
6.	Aŭstraliaj esperantistoj pri la lan dek laboro	-"-	9,5
7.	Pedagogia seminario pri sugestologio (X BET)	-"-	-"-
8.	Anti-Svadost (dispute pri la libro de Svadost)	I00	9,5
9.	E-koncertoj de blindaj esperantistoj el Riga	-"-	-"-
I0.	Parolanta letero el Angluje (S.Stefenson)	-"-	-"-
II.	Esperanto kaj socialismo(prelego de S.N.Podkuminer)	-"-	4,7

I2.Estona E-koncerto el XI BET	I00	9,5
I3.Parola letero el Ĉeĥoslovakio	-"-	9,5
I4.Parolaj leterej el Skotlando kaj Finlando	250	4,7 k 9,5
I5.Kantas Ĝorĝo Marjanoviĉ	250	I9
I6.Historio de E-Kavado en USSR (de N.F.Danevskij)	-"-	9,5
I7.Angla E-poetino Pento Rimanto Gregori	50	-"-
I8.Koncerto de KlaipédaE-kKlubo	I00	-"-
I9.J.Palu kaj J.Ojalo pri 54 E-Kongreso	-"-	-"-

REPor ricevi magnetofonbendojn kun interesanta vin teksto vinturnu al Magnetofona servo de SEJM.Nepre sendu puran magnetofonbendon.

A.B.Rogov

Novaĵoj el Ivanovo
(januaro-1974-Februaro)

I.Komenco de januaro en Moskvo ivanovanoj akceptis 2 hungarajn gastinojn.Unu el ili - Gabriella Ozs,kunlaborantino de "Juna amiko".

2.En 4 E-kursoj per komencantoj lernas E-ton proksimume 40 personoj kaj la kursoj per pregresantoj frekventas 20 geesperantistoj.La lastmaj pristudas problemojn de interlingvistiko,historion de E-Movado kaj E-literaturon.

3.Membroj de Ivanova E-klubo dum la novjaraj festotagoj vizitis 7-personon Vilnius-on,kie partoprenis la E-Renkontiĝon;dum la januaro-februara vizitis 4 kunvenojn en Moskva E-klubo.Fine de januaro 2 klubaninoj estis varme akceptitaj en Taŝkenta E-klubo.

T.Leskuteva (Ivanovo)

A N O N C O J

I.Kiu interesiĝas pri vegetarismo kaj apudaj problemoj povas aboni la revuon "Esperantista vegetarano" ĉe la adreso:

235015,Litovio,Vilnius-15,R.Armijoo pr.,250,

A.Ludickiene

La abonpago estas 3 rublo j.

Geesperantistoj,lak laboro per Esperanto multas.Tial abonu la revuon kaj vegetaranigu.Vin atendas longa vivo.

La I-5-an de maje okazos la 2I-a Okcident-Siberia E-Renkontiĝo.en Meĵdureĉensk(Kemerova regiono).Vin atendas E-seminarioto,balo,vizito al tajga,festvespero.Siberiaj kaj aliregionaj gastoj estas atendataj.Kontaktu al S.Kotljarev,.pr.Streitelej IO-9,Meĵdureĉensk-I4, Kemerovskoj obl.,652870.

Bonvenon en Meĵdureĉensk

Materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso:
656099,Barnaul-99,a.k.II,Esperanto-klubo.

Redaktis V.Ebelj;
tajpis N.Stolbun.